# A.E.A.-informilo

**Numero 11** — **Marto 2013**


## Poresperanta propagando en la Universitato

La 7an de marto okazis en la universitata areo de Vieskes la **1-a Foiro de Asocioj kaj Grupoj de la EPI** (la universitata inĝenieria fako) en kiu partoprenis dekduo da gestudentaj asocioj kaj rondoj de tiu universitata komplekso. Nia **Astura Esperanta Asocio**, kiel grupa membro de la **Katedro "Jovellanos" pri Universitata Disvastigo**, rajtis partopreni en tiu aranĝo kun propra stando. Ni profitis la okazon por propagandi pri nia Esperantista afero kaj disdoni informilojn pri la utileco kaj neceso de internacia lingvo kia Esperanto. La prezidanto de la **AEA**, Carlos E. Carleos, kaj la sekretario, Faustino Castaño, deĵoris dum la daŭro de la Fojro por akcepti la gevizitantojn kaj respondi iliajn demandojn.

Tiutipaj publikaj aranĝoj ege utilas por la diskonigo de nia celo kaj informi pri la ekzistado de nia esperantista asocio kaj ĉi ties preteco gvidi kursojn pri Esperanto. Tion ni jam estis konstatintaj okaze de la Fojroj de la Lingvoj okazintaj en nia urbo antaŭ kelkajn jarojn.

En nia stando, krom libroj, diskoj kaj revuoj en Esperanto, estis ankaŭ komputilo per kiu oni povis prezenti al la vizitantojn ateston pri la ĉeesto kaj graveco de Esperanto en ***Interreto.***

Plejparto el la vizitantoj de nia stando estis gestudentoj; iuj estis koninte antaŭe nenion pri Esperanto, sed aliaj sciis pri la afero kaj sentis ian intereson pri ĝi. Iu el ili eĉ estis iam vizitinte en Interreto la paĝon de **Astura E. Asocio**. Ni devas atenti ankaŭ pri tiu ilo de diskonigado de nia afero kaj pliriĉigi ĝian enhavon. Estus interese ke la tuta membraro de nia Asocio laŭeble partoprenu en la prilaborado de tiu ret-paĝo.

